

Sesias internacia kunveno pri sciencoj de la Tero en Kubo



Havano, apr 5 (RHK) La esplorado de mineralmetalaj rimedoj, energetikaj kaj akvo ligitaj al la situacio ekonomia frontata de Kubo, estas kelkaj temoj pridiskutataj ĉi-lunde en la 9-a kunveno de sciencoj de la Tero.

La temaj aktoj de la renkontiĝo sesionta ĉi la 9-a de aprilo fokusiĝas en kvin virtualaj kongresoj pri Geologio, Geofiziko, Minado, Petrolo kaj Gaso kaj Informadiko de la Geosciencoj.

Oni pritraktos la interrilaton inter la teknologio, la scioj kaj la socio por meti la geosciencojn kiel instrumento je la evoluservo.

Aliaj temoj estos agroindustrio, krudaĵoj por fabriki konstrumaterialojn kaj la apliko de la teknologioj por krei novajn produktojn.

Same oni debatos pri la esplorado kaj ekspluatado racia de la mineralaj kaj energetikaj rimedoj kun respekto al la primediaj regula?oj.

Krome oni pritraktos la klerigadon de la lo?antaro por alfronti la eblajn geologiajn riskojn, la esploradon de hidrokarbidoj, geodiverseco, utiligo kaj konservado de akvoj.

La evento havos gastojn kaj prelegantojn el diversaj landoj, interalie, el Hispanio, Brazilo, Kanado, Usono kaj Urugvajo.

Fonto: PL

<https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/253036-sesias-internacia-kunveno-pri-sciencoj-de-la-tero-en-kubo>



Radio Habana Cuba